

Miaj rilatoj al Pollando

Oldřich Arnošt Fischer

Prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
la 27-an de februaro 2019

Moto:

„Ĝisnuna reĝimo – armita per sia orgojla kaj netolerema ideologio – degradis la homon al produkta forto kaj la naturon al produkta ilo. Tiel ĝi atakis iliajn proprajn fundamentojn kaj iliajn reciprokajn rilatojn.

El talentitaj kaj memrajtaj homoj, inĝenie mastrumantaj en sia patrujo, la reĝimo kreis ŝraŭbojn de iu monstre granda, brueganta kaj malodoranta maŝino, kies sencon verdire neniu scias.

La maŝino kapablas fari nenion alian krome tio, ke ĝi nur malrapide, sed senhalte eluzas sin mem kaj ĉiujn siajn ŝraŭbojn.“

Václav Havel, la 2-an de januaro 1990

Enkonduko

Kiam mi eklernis en la unua klaso de baza lernejo (tio okazis la 1-an de septembro 1961 en la urbo Bruntál), el la bildo sur muro rigardis min tiama prezidento Antonín Novotný (1904-1975), kiu ekde la jaro 1953 estis ankaŭ la 1-a sekretario de Komunisma Partio de Ĉeĥoslovakio (KPCĈ). En januaro 1968 kelkaj komunistoj, kiuj en Ĉeĥoslovakio volis reformi socialismon, sukcesis ŝanĝi la situacion tiel, ke Novotný restis la prezidento de Ĉeĥoslovakio, sed lian funkcion de la 1-a sekretario de KPCĈ prenis juna slovaka politikisto Alexander Dubček (1921-1992).

Tiam mi estis nur 12-jara, sed mi bone rememoras, ke la homoj, kiuj ĝis tiu tempo nur apatie suferis de socialismo, reviviĝis. Ili fariĝis pli agemaj, pli amikaj, kaj diskutis eĉ pri ĝis tiu tempo tabuaj aferoj. Neniu volis neniigi socialisman reĝimon, sed la reformaj komunistoj dum tiel nomata Praga Printempo volis krei pli elteneblan formon de socialismo.

Ekzemple en lernejo ĝis la jaro 1968 ni devis alparoli nian instruistaron nur „kamaradino instruistino“, ĉar la „kamarado“ estis precipe la alparolo de komunistoj (kiel rusa товарищ). Vere en socialisma Ĉeĥoslovakio ni pli multe uzadis la alparolon „kamarado, kamaradino“ ol veraj rusoj. Dum Praga Printempo ni povis alparoli „sinjorino instruistino, sinjoro instruisto“. Tio al ni pli multe plaĉis kaj inter ni rapide disvastiĝis.

Miaj gepatroj estis komunistoj. Post la dua mondmilito, kiun ili ambaŭ travivis en malriĉaj ministaj familioj, ili estis plenaj de entuziasmo. En la jaro 1953 ili forlasis kredon de siaj antaŭuloj, fariĝis komunistoj kaj pri mi kaj poste pri mia fratino fiere diradis, ke ni estas edukataj „por socialismo“. Verŝajne ili poste multfoje bedaŭris sian decidon, sed ili timis la partion forlasi, ĉar la komunistoj kruele persekutis ĉiujn eksajn sampartianojn, kiuj ne plu volis servi sub ruĝaj flagoj. Mi estas dankema al miaj gepatroj, ke ili ebligis al mi studadon, sed se temis pri politiko, mi kun ili opinie tute disiĝis.

Ekde infanaĝo mi estis sub forta influo de komunisma propagando. La edukado estis strikte ateisma. Mi estis baptita, sed mia avo (baptopatro), ministro Arnošt Chatrný (1906-1970) ne devis min alkonduki en preĝejon. Kompreneble mi devige estis ruĝa pioniero, poste eĉ membro de Socialisma Asocio de Junularo (SAJ), sed pri politiko mi neniam interesiĝis. Pionieraj renkontiĝoj al mi ne plaĉis, ĉar ili ofte estis tre formalaj, malbone preparitaj kaj sensencaj, sed mi devis en ili partoprenadi. Jam en baza lernejo mi baldaŭ observis diferencojn inter vortoj de miaj edukantoj kaj iliaj veraj opinioj kaj agoj.

La hipokriteco de socialisma socio min tre ĝenis, sed mi ne sciis, kion kontraŭ tio fari. Trovi la veron ne estis facila.

1968 – Fino de mia infanaĝo

Situacio en Ĉeĥoslovakio sovetojn incitis. Leonjĉ Iljiĉ Breĵnjev (1906-1982) ĉeĥoslovakajn komunistojn multfoje admonis. Alexander Dubĉek, kiu flue parolis rusan, defendis ideon de ĉeĥoslovaka „socialismo kun humana faco“. Ni sciis pri traktadoj de Dubĉek kaj Breĵnjev en Ĉierna nad Tisou (orienta Slovakio, limo), sed estis optimistoj. Somere mia patro estis avertita. Lia laborantino, kiu ofte vizitadis siajn rilatojn en orienta Slovakio, rakontis, ke sovetoj koncentrigas sian armeon en Ukrainio, proksime la limo. Mia patro ne kredis. Laŭ li, se jes, tio povus esti nur militekzerco.

La 21-an de aŭgusto 1968 komenciĝis kiel bela tago. Mi kaj mia trijara fratino travivis belan someron ĉe niaj geavoj en la vilaĝo Ketkovice. Niaj gepatroj volis nin transporti hejmen, por ke ni en Ostrava-Poruba pretiĝu por lernejo kaj infanĝardeno. Matene mia familio kune matenmanĝis. Subite en korto aperis kuzino de mia patrino. Ŝi kuris al ni kriante: „Vi ĉi tie trankvile sidas nesciante, ke la milito estas! Rusoj nin atakis!“ Mia patro tenante panpecon kun butero en sia mano al ŝi trankvile respondis: „Certe vi freneziĝis. Ja rusoj estas niaj aliancanoj.“ Ni ekaŭdis nian radion. Nokte la armeoj de Sovetunio, Pollando, Orienta Germanio, Hungario kaj Bulgario transpasis nian limon. En Prago jam estas sovetaĵ tankoj. Restu trankvilaj. Ne provoku la okupantojn.“ Dum la tago oni la informon multfoje ripetadis. Ofte ili ludis la arion de hebreaj malliberuloj el la opero Aida, poste la kantojn de Voskovec, Werich kaj Ježek. Mi estis trista, ĉar tiam, matene la 21-an de aŭgusto 1968, finiĝis mia infanaĝo.

Tiam ni ankoraŭ ne sciis, ke kvin perfidaj ĉeĥoslovakaj komunistoj, kiuj ne volis reformojn de socialismo en Ĉeĥoslovakio, iam printempe en la jaro 1968 petis sovetojn por „helpo“. La „invitan leteron“ subskribis la komunistoj Drahomír Kolder (1925-1972), Alois Indra (1921-1990), Antonín Kapek (1922-1990), Oldřich Švestka (1922-1983) kaj Vasil Biľak (1917-2014). Aliaj komunistoj ebligis noktan surteriĝon de grandaj sovetaĵ transportaj aviadiloj, el kiuj eliris sovetaĵ tankoj rekte en ĉefurbajn stratojn. Kontraŭreforma komunisto Karel Hoffmann (1924-2013) blokis Ĉeĥoslovakian Radion, por ke ĝi ne informu civitanojn. Matene Prago, nia ĉefurbo, jam estis okupita, en stratoj iradis sovetaĵ tankoj kaj aliaj veturiloj, signifajn objektoj gardis sovetaĵ soldatoj.

Niaj soldatoj devis resti en siaj kazernoj. Ili volis defendi sian patrujon, sed ne devis. Ne ĉie ili pasive kapitulis. Ekzemple en Holešov (Moravio) juna soveta komandanto, tankisto, ordonis al ĉeĥoslovakaj paraŝutistoj doni al liaj tankistoj akvon kaj poste tutan kazernon. Li fiere minacis: „Ni havas dudek tankojn!“ Ĉeĥoslovaka komandanto donis al ili nenion kaj minacis al ili per batalo. Sovetoj, eĉ ili havis dudek tankojn, rapide fuĝis.

Brno, Vyškov, Olomouc, Přerov, Ostrava kaj multe da vilaĝoj estis plenaj de kontraŭsovetaĵ skriboj. Solidareco de popolo estis belega. Ni kredis, ke sovetoj ne sukcesos. Alexander Dubĉek, generalo Ludvík Svoboda (1895-1979), nia nova prezidento, Oldřich Černík (1921-1994), Josef Smrkovský (1911-1974), František Kriegel (1908-1979) k. a. estis popolaj herooj. Sed sovetoj alvokis reprezentantojn de Ĉeĥoslovakio en Moskvon. Ni esperis, ke ili antaŭ la okupantoj neniam kliniĝos. Bedaŭrinde ili ĉiuj krome Kriegel kapitulis. Ili rezignis kaj subskribis la protokolon, ke soveta okupado estas internacia helpo kontraŭ „kontraŭevolucio“. La prezidento Svoboda (kiel simbolo, ĉar „svoboda“ ĉeĥe signifas „libereco“) restis en sia funkcio ĝis la jaro 1975, sed jam en la jaro 1969 la unua sekretario de KPĈ fariĝis Gustáv Husák (1913-1991), kiu estis fervora komunisto. Husák poste fariĝis prezidento.

En la jaro 1969 komunistoj, kiuj konsentis kun la okupado, ekzamenis aliajn komunistojn. La plej signifaj demando estis, ĉu ekzaminata komunisto konsentas

kun la okupado. Mi observis, ke malaperis nia direktoro, kiu min instruis germanan ligvon, la instruistino de angla lingvo kun tuta sia familio elmigris.

Regimento de Holešov estis neniigita. Homoj, kiuj ne konsentis kun la okupacio, estis punitaj, precipe maldungitaj.

Studento Jan Palach (1948-1969) brulmortiĝis. Tiel li protestis ne nur kontraŭ la okupacio, sed precipe kontraŭ tio, ke granda parto de socio rapide adaptiĝis al nova situacio. Pri aliaj homoj, kiun ankaŭ brulmortigis (Ryszard Siwiec, Jan Zajíc, Evžen Plocek, Michal Lefčík, Josef Hlavatý, Vasyl Omeljanoviĉ Makuĥ k. a.), ni ne sciis. Cenzuro jam plene funkciis. En la lernejo denove nin instruis „kamaradinoj instruistinoj“.

Kiam mi kun mia patrino unuafoje en mia vivo vizitis Pragon (en oktobro 1969), mia unua impresio el la ĉefurbo estis la fasado de Nacia Muzeo, kiu estis damaĝita per kugloj el sovetaj mitraletoj. Mi ne komprenis, kial sovetaj soldatoj bezonis pafi kontraŭ la Muzeo, se neniu kontraŭ ili pafis.

1970-1974 – mezlerneja studado

En mezlernejo mi ne estis sukcesa precipe en matematiko kaj gimnastiko, sed mi fervore pretiĝis por studado en la universitato. Samklasanoj mokis min, ke mi ŝatas deklami rusajn versaĵojn. Miaj malamikoj ne estis rusa lingvo kaj rusa kulturo, sed politikistoj en Moskvo kaj Prago, ĉar en tuta lando super ni regis la komunistoj, kiuj konsentis kun la okupado. Unu instruisto timis alian instruiston. Ili ankaŭ timis studentojn, ĉar inter ili povis esti denuncantoj. Mi povis sincere diskuti, kaŝe, en libera tempo, nur kun juna instruistino Jaroslava Nehybová (1949-2008), kiu unu jaron min instruis ĉeĥan lingvon.

Sub influo de libroj de Jaroslav Foglar (1907-1999) k.a. mi kalcitris kontraŭ socialisma kvazaŭmoralo. Ekzemple dum studado en la mezlernejo mi ne akceptis sufloradon. Al miaj samklasanoj mi diradis: „Bonvolu ne suflori al mi, se mi estos ekzaminata kaj ion ne scios. Mi mem devas ekmemori korektan respondon.“ Iam eĉ okazis, ke miaj samklasanoj volis al mi helpi, sufloris al mi, sed mi intence ilin misaŭdis kaj en la ekzamino ne sukcesis. Sed alie mi al neniu sufloris. Mi diradis al miaj samklasanoj: „Dum la paŭzo mi al vi helpos, eksplikos al vi ĉion, kion vi bezonos ekspliki, sed se vi jam estos ekzaminataj, bonvolu batali honore, sen la suflorado.“ Tial miaj samklasanoj min malamis kaj mokis. Tiuj, kiuj volis aspekti kiel herooj, estis senrespektaj rilate de niaj instruistoj, fakte fidis protektojn de siaj potencaj patroj, kiuj por ili prizorgis bonajn laborlokojn.

Mia patro volis, por ke mi sekvu lin, fariĝu la kuracisto, sed mi tiel forte malamis protekton kaj korupton, ke mi decidis studi en la Bestkuracista Universitato en Brno (1974-1980). Mi ne volis havi la protekton kaj ŝatis bestojn.

1974-1980 – universitata studado

Bedaŭrinde ankaŭ en la Bestkuracista Universitato en Brno en la jaro 1969 ekregis la instruistoj, kiuj konsentis kun soveta okupado.

Inter pedagogoj, kiuj estis bonegaj fakuloj kaj pedagogoj, sed ne devis docentiĝi, estis la botanikisto Jaromír Šikula (1924-2000), longtempa sekretario de Esperantista Klubo Brno. Bedaŭrinde tiam mi sciis tute nenion pri esperanto.

En SAJ mi okupiĝis pri la plej nepolitika agado: aranĝado de studentaj fakaj konferencoj.

La unuaj du jaroj de studado estis tre malfacilaj. En malmulte da libera tempo mi ekhelpis en la katedro de biologio kaj post unu jaro en la katedro de parazitologio. Mia instruisto estis Rostislav Zavadil (1930-2002), kiun studentoj ŝatis. Ankaŭ li apartenis al la fakuloj, kiuj ne devis docentiĝi. Li devigis min partopreni en Studenta Scienca Konferenco en Varsovio (1976). Tio estis mia unua eksterlanda konferenco. Mi prelegis anglalingve. Polaj studentoj el Agrokultura Altlernejo pri mi kaj miaj du kolegoj bone zorgis.

Dum neoficiala babilado ili diris, ke al li ne plaĉis la atako de pola armeo kontraŭ Ĉeĥoslovakio en la jaro 1968. Tiam poloj ekonomie suferis: kelkaj nutraĵoj estis porciumitaj. Ĉe ni en Ĉeĥoslovakio tiu sistemo de porciumado ekzistis nur dum la dua mondmilito.

Aprilo-aŭgusto 1980 – en mia unua laborloko

Post studado mi ne volis resti en la universitato, ĉar tie ne estis libera laborloko kaj mi volis eviti politikan premon. Mi sendepende trovis laborlokon en Parazitologia Instituto de Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj en České Budějovice. Scienca laboro al mi tre plaĉis, sed mia ĉefo estis fervora komunisto. Ni povis kunlabori, sed mi jam laŭte dubis pri socialismo kaj tio al li ne plaĉis. Dum tuta semajno mi loĝis en České Budějovice en tre modestaj kondiĉoj, sed vendrede mi iradis al mia edzino en Brno. La veturado daŭradis kvin horojn. Rapida trajno estadis plena. Iam mi devis stari en koridoro. Najbare de mi staris grupo de junaj gepoloj. Ni baldaŭ ekbabilis. Ili eĉ kantis al mi la kanton Rozsumiały się wierzby płaczące (Plorsalikoj eksusuris). Tio estas bela kanto pri pola gerilano. Sed nia trajno iris preter du grenejoj. Sur muro de unu grenejo estis per grandegaj bluaj literoj la skribo „ĈSSR“ (Ĉeĥoslovakio) kaj sur la muro de la dua grenejo per grandegaj ruĝaj literoj la skribo „SSSR“ (Sovetunio). Pola knabo, kiu staris en la koridoro plej proksime de mi, ĉesis sian ridon kaj malŝate al mi diris: „Kia nacio vi estas!“ En tiu momento mi tre ekhontis.

1980-1981 – militservo

Post kvin monatoj mi ĉesis mian sciencan laboron, por servi en ĉeĥoslovaka armeo. Mi ne volis uzi protekton por eviti armean servon. La 1-an de septembro 1980 mi soldatiĝis en Slaný (Centra Bohemio, malproksime de Brno). Vespere oni min kun grupo de samaĝaj soldatoj-diplomitoj transportis en Terezín. Tie ni restis kvar semajnoj. Mi tre bedaŭris perditan tempon. Ĝis tiu tempo mi estis kutimita aŭ studi aŭ ion fari, uzi ĉiun minuton. En armeo mi povis fari nenion.

Ĉiuj krome unu kolego kaj mi estis kuracistoj. El Terezín oni min sendis al tanka regimento en la urbon Rakovník. Mi havis la rangon apuntato-diplomito, ĉar en la universitato ni du jarojn preparis por servo en Ĉeĥoslovaka Popola Armeo (ĈPA). Mi tiam estis naiva kaj kredis al propagando, kiu prezentis la armeon kiel la lokon, kie estas perfekta ordo. Dum la militservo mi eksciis, ke nenie estis pli granda malordo ol en socialisma armeo.

Ĉu la armeo vere estis „popola“? Ekzemple manĝado estis bona ekzemplo de tute nepopola sistemo. Soldatoj manĝis en du grandegaj manĝejoj. Ili uzadis aluminiajn vazojn kaj kulerojn. Nur se iu ajn kontrolo alvenis, la soldatoj povis manĝi uzante telerojn. Kiam la kontrolo foriris, la teleroj estis rapide kaŝitaj en stokejon – kaj la soldatoj denove uzadis siajn aluminiajn vazojn. Oficiroj kaj la diplomitoj manĝis en oficira manĝejo. La manĝejo estis pura kun tablotukoj. Oni manĝadis uzante du telerojn kaj manĝilarojn. Kaj en speciala saloneto kune manĝadis komandanto de la regimento, ĉefa politgvidanto, ĉefa teĥnikisto kaj ĉefo de ariero. Unu kuiristo devis vestiĝi kelneran bluzon kun blazono de ĈPA kaj servi al ili. Tiu kasta sistemo en kiu estis barieroj inter regimenta komandanto, kiu kondukis kiel orienta despoto, aliaj oficiroj kaj soldatoj estis nur unu el rideblaj absurdaĵoj de ĈPA.

Propagando prezentis la armeon kiel la institucion, kie junaj viroj lernas defendi sian patrujon. Mi dun du jaron de universitata preparado, unu jaro de arma servo kaj tri militekzercoj nur trifoje pafis el mitraleteto, dufoje el pistoleteto, kaj unu veran granaton ĵetis. Ĉu mi post tiu „trejnado“ povas kapabli bone pafi? Nun mi kapablas defendi mian patrujon maksimume kun la bastono.

Mia persona armilo? Jes, mi havis mian personan pistoleteton. Ĝi havis sian inventaran numeron. sed mi neniam mian pistoleteton ekvidis. Oni al mi diris al mi, ke mia pistoleteto estas tiel terure korodita, ke oni ne povas ĝin al iu montri.

Tankistoj lernis pafi el tankoj kaj mitraloj. Rezultoj de la pafado estis kontrolita. Sed la soldatoj pafis tre malbone. Tial ĉefaj personoj de ĉiu pafado estis la soldatoj, kiuj aranĝis la pafcelojn. Ili imitis forestitajn trafojn en mitraloj per najloj. La trafoj de tanka pafilego estis imititaj per fikskrampoj. Kiam ili faris sufiĉe da falsitaj trafoj, ili ĉiujn trafojn (falsitajn kaj nefalsitajn) sumigis kaj la rezulton meldis al regimenta komandanto. Tial eĉ malbona pafado estis bonega pafado – kaj ĉiuj estis kontentaj. Ĉeno de mensogoj kaj trompoj – tio estis vera faco de ĉeĥoslovaka armeo dum socialismo, la reĝimo de mensogoj kaj trompoj.

Mi devis loĝi en mia bataliono, sed dum la tago helpi en regimenta ambulatorio. Tial min komandis la komandanto de bataliono kaj ankaŭ ĉefa kuracisto (profesia oficiro, superlejtanto) kaj juna kuracisto (diplomito). Mi helpis en la ambulatorio kaj plenumis ordojn de ĉefa kaj juna kuracistoj. En kazerno de la regimento estis malbonaj higienaj kondiĉoj. Mi observis parazitojn de homoj: skabion (kaŭzatan per la akaro *Sarcoptes scabiei*), laŭsojn (*Phthirus pubis*). Triono de soldatoj suferis de tineo de piedoj. La soldatoj, kiuj ofte laboris kun petrolaj produktoj havis sur haŭto ulcerojn. Dum trejnado soldatoj povis esti vunditaj de eksplodaĵoj. Specialaĵo de tankistoj estis kontuzitajn aŭ traŭmate amputitaj fingroj. Kelkaj soldatoj nur simulis malsanojn por povi fuĝi. En kazerno oni ne devis trinki alkoholaĵojn, sed ne nur kelkaj soldatoj, sed ankaŭ oficiroj estis alkoholuloj. Fumado estis ofta. Dum socialismo oni ne uzadis verajn drogojn, sed kombinis misuzon de medikamentoj kaj alkoholo. Kelkaj soldatoj jam antaŭ arma servo estis punitaj per malliberejo. Ofte soldatoj faris manifestaciajn suicidojn. Ili tranĉis siajn manojn, intence sin vundis. Ni havis specialan kajeron, en kiu mi skribis protokolojn pri kontrolo de diversaj objektoj de kazerno. Sed kontroloj estis neefikaj. Se mi protokolis iun difekton, venontfoje mi devis protokoli la saman difekton, sed nenio pliboniĝis. Mi estis malfeliĉa, ĉar mi ofte devis fari tiun kvazaŭlaboroj. Baldaŭ min ne ŝatis soldatoj, kiujn mi kontrolis, oficirojn, kiujn volis havi trankvilan vivon, kaj eĉ kuracistoj, kiuj ankaŭ bone adaptis al ĝenerala arma malordo.

Unu oficiro (kapitano) pedante kontrolis, se ni regule faras ĉiujn kontrolojn. Tio estis lia unusola laboro, ĉar alie li faris tute nenion. En la kazerno estis nekvalita akvo. Ĉefa kuracisto al mi ordonis preni specimenojn de trinkebla akvo el ĉiuj akvaj fontoj de la kazerno. Poste li ordonis la akvon steriligi, por ke specialistoj en laboratorio trovu neniujn mikroorganismojn. Tial la rezultoj de ekzaminado estis falsitaj. La akvo estis formale perfekta, sed vere danĝera.

Antaŭ mia alveno al la regimento okazis, ke dum ekzerco mortis unu soldato per kora malsano. La regimento konkuris pri iu socialisma honora titolo kun aliaj regimentoj de la divizio. Tial oficiroj nomon de la mortinto transdonis en personan liston de alia regimento.

Iam nokte iu ebria oficiro alvenis en kazernon. Liaj soldatoj el lia roto dormis. La oficiro ilin per kriaĉo vekigis kaj ordonis al ili kuri ĉirkaŭ la konstruaĵo. Tio havis neniun sencon, neniun celon. En mallumo unu el soldatoj trafis liberigitan fulmokondutilan draton kaj elpikis sian okulon.

Ĉu mi povis plendi? Ne, ĉar mi povus nur plendi pri unu komunisto al la alia komunisto. SAJ ekzistis en la regimento – sed nur formale.

Mi ne estis ŝatata, tial ĉefo de ariero kun siaj soldatoj preparis intrigon kontraŭ mi. La soldatoj falsis mian subskribon. unu soldato fuĝis. La arierestro min akuzis, ke mi al la soldato helpis fuĝi. Kiam la soldato revenis en kazernon, li estis punita per dutaga malliberejo. Mi estis punota per trisemajna malliberejo. Bonŝance kuracistoj min volis sendi en tankan pafejon. La 21-an de novembro 1980 mi vespere ekveturis en trajno plena de tankoj en la pafejon. Veturado daŭris du tagojn, ĉar la trajno iris malrapide kaj ofte staris en diversaj bohemiaj stacidomoj. La pafejo apartenis al okupacia soveta armeo. Mi tie deĵoris, observis komencon de vintro. Ĉiuj batalionoj jam finis siajn trejnadojn, sed nur mi tie devis servi

permanente. Klimataj kondiĉoj estis malbonaj. Vintro kun forta frosto alvenis jam en novembro. Tagajn temperaturoj en montaro oscilis ĉirkaŭ -15 °C, noktaj ĉirkaŭ -20 °C. Mi havis sur mi ĉiun mian vestaĵon por ne frostmorti. Laŭ situacio mi estis transportata en diversaj veturiloj, eĉ en tanko. Plej malbone estis, kiam ekestis granda ĥaoso. Nia komandanto ien foriris, mi restis kun grupo de soldatoj sen manĝaĵo, kun unu tendo, kiu havis nek izoladon kontraŭ la frosto, nek plankon. Ni dormis sur neĝo, sub blovmatracojm ni donis piceajn branĉojn. Ankaŭ ni degelis neĝon por havi akvon, kaj kuiris teon. Ni havis neniujn informojn.

La agado KARKONOŜE

Post du tagoj alvenis tuta nia regimento. Multe da soldatoj estis novaj rekrutoj. Mi ilin bedaŭris, ĉar ili ne estis kutimitaj al frosta vetero. Kial tio okazis?

Pollando estis parto de soveta bloko ekde la jaro 1947, post falsita balotado. La unua krizo de pola socialismo aperis en la jaro 1956. Władysław Gomułka (1905-1982) volis fari reformojn, krei „nacian vojon al socialismo“, sed poste li subtenis atakon kontraŭ Ĉeĥoslovakio en la jaro 1969. Edward Gierek (1913-2001), kiu Gomulkon anstataŭis, devis foriri el politika scenejo post ondo de strikoj. Reprezentanto de Pola Unuiĝita Laborista Partio (polaj komunistoj) en la jaro 1980 estis Stanisław Kania (nask. 1927).

Ĉeĥoslovakaj komunistoj volis helpi la sovetoj kaj orient-germanoj neniigi la movadon Solidareco (Solidarność) en Pollando. Jam en septembro 1980 ĉeĥoslovaka generalo Miloslav Blahník (nask. 1927) el Moskvo alportis sekretajn instrukciojn. Ĉe niaj nordaj slavaj najbaroj, kies lando estis en pli malbona ekonomia situacio ol nia lando, jam en junio 1980 ekkreskis ondo de malkvieto, kiam oni plialitigis prezon de viando. El Lublin la malkvieto disvastiĝis en tutan Pollandon. Laboristoj, fervojistoj, oficistoj k. a. partoprenis en grandaj protestoj.

En septembro 1980 en Gdınjo estis fonditaj Sendependaj Aŭtonomiaj Sindikatoj (Solidareco), kiujn gvidis elektroteĥnikisto Lech Wałęsa. Danke al spertoj en la jaro 1970, kiam pli ol 40 homoj estis pafmortigitaj en Gdańsk kaj Ŝtětín, la Solidareco aranĝis ne stratajn manifestaciojn, sed okupadan strikon de laborlokoj.

El sovetoj la agadon kontraŭ Solidareco planis precipe la ministro de defendo de Sovetunio Dmitrij Fjodoroviĉ Ustinov ((1908-1976), la ministro de eksterlandaj aferoj Andrej Andrejeviĉ Gromiko (1909-1989) kaj ĉefo de soveta kaŝpolico KGB Jurij Andropov (1914-1984).

Ĉeĥoslovakio aranĝis divizian taktikan ekzercon, en kiu partoprenis **17 309 soldatoj, 541 tankoj, 261 batalaj veturiloj de infanterio, 335 kirasitaj transportiloj, 139 pafilegoj kaj multe da aŭtomobiloj**. La ekzerco havis la nomon Družba 80 (Amikeco 80), sed fakte tio estis agado por timigado de polaj demokratoj. La ekzercon faris du tankaj divizioj: la 1-a divizio el Slaný kaj la 9-a divizio el Tábor. Krom tio estis alvokitaj du divizioj el Germana Demokratia Respubliko, minimume ses divizioj el Blankrusio kaj Ukrainio. La agadon povis subteni ankaŭ soveta divizio el Moravio (Libavá). Ĉeĥoslovaka armeo havis komandon akiri elirajn poziciojn la 5-an de decembro. Kaŭze de malvarma vetero ĝi tion sukcesis nur la 8-an de decembro 1980.

La dua fazo, „fronta komandanta-staba ekzerco en teritorio de Pollando“ ne okazis, sed kelkaj garnizonoj havis batalpretecon ĝis la jaro 1982.

Dum transporto multe da akcidentoj okazis, soldatoj suferis de frostvundoj (eĉ iliaj fingroj estis amputitaj), tendoj mankis, soldatoj ne havis 30 horojn ion manĝi (ili nur teon trinkis). Ankaŭ en mia regimento okazis kazoj de frostvundoj, sed ĉefa kuracisto (superlejtanto) al ni, kiel arma oficiro, malpermesis uzadi la fakan terminon „frostvundo“ (latine: *congelatio*). Anstataŭ „frostvundo“ ni devis diradi „haŭta inflamo“ (latine: *dermatitis*).

Mi tre miris, ke la kuracisto, kiu studis medicinon el la Armea Kuracista Universitato en bohemia urbo Hradec Králové, edukita homo, kapablis tiel morale degeneri.

Profesiaj soldatoj, kiuj ne volis en la agado partopreni, estis maldungitaj. Ĝis nun ili ne estis rehabilititaj. La armeo portis ankaŭ akvajn pafilefojn, piprajn sprailojn kaj precipe multe da ĉerkoj. Nekutime la tankoj transportis municion kaj veturis tra ŝoseoj, ĉar fervojo ne kapablus tiun grandegan amason da veturiloj transporti.

La 8-an de decembro poloj miris, ke ili scias tute nenion pri planita militekzerco en Pollando. Plimulte da komandoj estis nur voĉe, ne skribite.

La soldatoj rapide entankigis ŝargojn. Unu ŝargo estis unu metron longa, tre peza. La ŝarganto ĝin apenaŭ kapablis levigi. Kelkaj ŝargoj havis akrajn pintojn. Unu oficiro, kiu havis bonan humuron al mi eksplikis, ke la pinto kapablas transbruligi kirason de malamika tanko. En la tanko ĝi eksplodas kaj mortigos ĝian personaron. Aliaj soldatoj entankigis maŝinpafilojn.

Vidante tion mi ekmemoris pri granda moravia humanisto Jan Ámos Komenský (1592-1670), kies junulo en la romano „Labirinto de la Mondo kaj Paradizo de la Koro“ (1631) demandis soldatojn: „**Kontraŭ kiu kruela sovaĝa monstro vi pretigas tiel multe da teruraj armiloj?**“ La respondo estis: „**Kontraŭ homoj.**“

Vespere oni min transportis en iun kazernon, kie mi post multe da tagoj povis rapide preni duŝon. Mi opiniis, ke oni sendos min en nian kazernon, sed ne. Mi devis denove vestigi malpuran vestaĵon kaj nokte veturi. Mi eksuferis de nazkataro, sed la frosto estis tiel forta, ke mi dum unu tago spontane resaniĝis. La regimento konstruis grandan kampon. Vivo de soldatoj denove estis strikte organizata. Multe da kontroloj el nia divizio kaj diversaj generaloj alvenis. Mi neniam vidis tiel multe da generaloj.

Vespere oni komandis: „Donu viajn valizojn en la veturiloj. Se nokte eksonos la signalo „Karkonoŝe“, vi rapide neniigos la tendaron kaj iros en Pollandon.“

Kiam estis mallumo, mi obeeme portis mia dorsosakon en unu el transportiloj. Ĉiuj veturiloj (tankoj, transportiloj, aŭtomobiloj) estis aranĝitaj en grandega kvadrato. Forte frostis. Mi pensis, ke la socialisma reĝimo volas min misuzi al granda krimo. Ĉu mi povas pafi kontraŭ poloj, kiuj estas eĉ pli grandaj mizeruloj ol ni? Ĉu mi uzos armilon kontraŭ la studentoj el varsovia universitato? Ĉu mi kaj multe da aliaj knaboj ĉi tie suferas nur por savo de putra socialismo? Ĝenerale poloj ne estas miaj malamikoj, nur polaj, sovetaj kaj niaj komunistoj! Mi ne timis pri mia vivo, sed suferis de granda honto, ke mi, edukita homo, estis pelita kontraŭ poloj.

Neniu min observis. Mi laŭte ofendis nian socialisman reĝimon, tutan Varsovian pakton, kaj ĵuris, ke se mi tiun stultan aventuron transvivos, mi kontraŭ socialismo batalos. Poste mi revenis en troplenigita tendo kaj baldaŭ eldormis. Nokto estis trankvila, sen la signalo „Karkonoŝe“. Ni travivis ankoraŭ unu ĥaosan tagon, sed vespere ni ricevis la komandon reveni en nian kazernon. Sovetoj la 9-an de decembro 1980 decidis fini la ekzercon. Ne pro tio, ke ili pliboniĝis, sed pro tio, ke ili timis de usonanoj kaj samtempe batalis en Afganio (1979-1989).

Reveno en kazernon estis granda honto. Dum tuta nokto, kiam ni veturis, nia regimento perdis trionon da tehniko, tankojn, aŭtomobilojn, transportolojn. Unu kirasa transportilo ekflamis, la komandanto kaj liaj soldatoj sukcesis fuĝi kaj nur el kaŝejo observis kiel municio en la brulanta transportilo eksplodas. La regimento faris multe da damaĝojn sur ŝoseoj, bariloj kaj muroj.

En Pollandon forveturis nur iuj ĉeĥoslovakaj policanoj, por observi la situacion.

En kazerno ni lavis nin. Mi post 19 tagoj, kiam mi portis ĉiun vestaĵon sur mi kaj ne povis lavi min, forte malodoris. Mi ne estis malliberigita, sed travivis ankoraŭ multe da malagrablaj situacioj.

Pola marŝalo Wojciech Witold Jaruzelski (1923-2014) finis polan krizon la 13-an de decembro 1981, kiam li proklamis eksterordinaran situacin en Pollando.

Socialismo estis la reĝimo de mensogoj kaj trompoj

La 31-an de aŭgusto 1981 mi revenis hejmen. Mi estis malsana post lasta militekzerco de mia regimento. Hejme kaj en nova laborloko mi rakontis, kion mi travivis. Sed miaj gepatroj kaj aliaj homoj volis nenion aŭskulti. Ili vivis en socialismo kredante al propagando, kiu prezentis polojn kiel bigotajn pigrulojn. Tio estis por mi granda deziluizo.

Mi koncentriĝis pri mia nova laboro kaj familia vivo, sed en socialisman socion mi ne kapablis reveni. Post du jaroj, la 13-an de februaro 1983 mi membriĝis en Ĉeĥoslovakana Popolana Partio (kristana demokrata partio). Duono da partio kunlaboris, sed mi eniris en bonegan lokan organizon en Brno-Řečkovice, ki neniam kunlaboris. Reakcio de komunistoj en mia laborloko estis rapida. Ili devigis min forlasi Popolana Partio – kaj fariĝi komunisto. Sed mi mian partion neniam perfidis.

En la jaro 1985 mi, 30-jara viro, eniris en preĝejon. Mi aŭskultis muzikon, sed ankaŭ predikon. La Vorto de Dio al mi ekplaĉis, tial mi baldaŭ denove alvenis kaj poste jam regule partoprenadis en romkatolikaj diservoj. Post tri jaroj de preparado, printempe en la jaro 1989 mi fariĝis kredanto kun ĉiuj rajtoj. En la jaro 1991 mi esis konfirmita. Mia pozicio en mia laborloko estis malbona kaj ankaŭ hejme mi aŭdis multe da riproĉoj. Sed mi sentis, ke mi batalas en bona loko de la barikado.

En la jaroj 1993-2000 mi loĝis en moravia vilaĝo Ketkovice. Drako de ateismo tie prezentis sian forton, ĉar en preĝejo de Sankta Katarino, kie mi ekhelpis al pastro kaj preĝejservista familio, renkontiĝadis nur 50 kredantoj. Precipe maljunuloj kaj malgrandaj infanoj. La homoj de meza aĝo mankis.

En la jaro 1995 la papo Johano Paŭlo la 2-a. Tio estis granda polo. Nia pastro petis min gvidi la aŭtobuson kun kredantoj en la urbon Olomouc (Moravio), kie okazis la renkontiĝon kun la papo. La preĝejservisto mendis la aŭtobuson. Tiam mi estis malsana de duonflanka bronĥitido, sed mi ne povis ne partopreni. Frumatene, ankoraŭ dum mallumo, mi iris en najbaran vilaĝon, tie mi atendis la aŭtobuson. Ni veturis tra kelkaj vilaĝoj, por ke la buso estu plena, tio signifas: pagita. En Olomouc mi staris inter multe da kredantoj en flughaveno. Mi vidis la papon, sed precipe mi estis kortuŝita, kiam Johano Paŭlo la 2-a pardonpetis ĉiujn nekatolikojn por malbonojn, kiujn al ili en tuta historio kaŭzis la katolikoj, sed ankaŭ li perdonis al nekatolikoj ĉiujn malbonojn, kiujn ili kaŭzis al la katolikoj.

Tio estis unu el la plej grandaj momentoj en mia vivo.

Mia hobbio estas entomologio. Mi neniam lernis polan lingvon, sed por determinado de insektoj mi uzadas polajn determiniojn el la eldonserio Klucze do oznaczania owadów Polski (Determiniloj por Polaj Insektoj). Mi polan lingvon bone komprenas. Kaj danke al esperanto mi en Pollando havas amikojn.

Dum mia militservo mi ofte sendis hejmen leterojn, precipe al mia edzino. Mi opiniis, ke ŝi amas min. Kiam mi revenis, post tri jaroj mi volis tralegi miajn leterojn, kiuj enhavis detalan priskribon de armea vivo en socialisma armeo, vortareton de tiama soldata slango, historiajn datojn. Mia edzino al mi diris, ke ŝi intence ĉiujn miajn leterojn neniigis...

La historion de la Agado Karkonoŝo esploras en Ĉeĥa Respubliko la organizo Post Bellum (Post la Milito) kaj en Pollando la organizo Ośrodek Pamięć i Przyszłość (Centro Memoro kaj Nuntempo).

Rekomendita literaturo

- BLAŽEK, P. 2008: Živá pochodeň na Stadionu Desetiletí. Protest Ryszarda Siwce proti okupaci Československa v roce 1968. ÚSTR Praha, 93 paĝoj.
- BLAŽEK, P. 2012: Československo a polská krize 1980-1981. Securitas imperii, 20: 58-75.
- BLAŽEK, P. 2013: První následovník. Sebeupálení Josefa Hlavatého 20. ledna 1969. Paměť a dějiny, 7: 95-102.
- BLAŽEK, P. 2014: Slovenský následovník? Šest dokumentů k sebeupálení Michala Lefčíka v Košicích 11. dubna 1969. Paměť a dějiny, 8: 58-68.
- BLAŽEK, P. – KINDLEROVÁ, R. 2016: Živá pochodeň na ukrajině. Sebeupálení Vasyla Omeljanovyče Makucha v Kyjevě 5. listopadu 1968. Paměť a dějiny, 10: 73-90.
- CIGLBAUER, J. 2017: Tragická smrt vojáků ČSLA v Židově strouze roku 1980. <https://www.severniceskobudejovicko.cz/2017/01/23/23.01.2017>.
- FISCHER, O. 1994: Signál Krkonoše. Hlas, 15: 10.
- FISCHER, O. 1994: Rok osmačtyřicet a bourání pyramidy. Hlas, 15: 10.
- FISCHER, O.A. 1996: Aby ses, chlapče, do něčeho nenamočil... Hlas, 47: 7.
- FISCHER, O.A. 2012: Profesoro Venceslao Dyk, la parazitologo. www.literatura.bucek.name/brno/fischer_profesoro-venceslao-dyk.pdf , 23.5.2012.
- FISCHER, O.A. – STIER, G. 2015: Bibliaj Tagoj en Vroclavo. www.literatura.bucek.name/brno/fischer_vroclavo.pdf , 23.5.2012.
- KAŇÁKOVÁ, B. 2011: Solidarita. <https://www.moderni-dejiny-pl.csr.blogspot.com/2011/11/solidarita.html> , 30.11.2011.
- KUČERA, T. 2015: Věděli jsme, že jdeme na Poláky, vzpomínají vojáci na chystanou invazi. https://www.idnes.cz/hradec-kralove/zpravy/ceskoslovenska_ , 20.12.2015.
- MALOVEC, M. 2018: Ni rememoras. www.literatura.bucek.name/brno/malovec_vondrousek.pdf . 02.12.2015.
- MLEJNEK, J. 2010: Moje cesta k Chartě 77 a Listopad 1989. Paĝoj 55-60. In: CHVÁTAL, M. (ed.): Listopad 1989 v Československu. Sborník příspěvků z konference, 10.10.2010, Havlíčkův Brod, Muzeum Vysočiny, 77 paĝoj.- ISBN 978-80-8732-04-0.
- PODHRADSKÁ, V. 2012: Grava persono en Brno Doc. RNDr., RNDr., MVDr. h. c. Ing. Jaromír Šikula, CSc. www.literatura.bucek.name/brno/podhradaska-sikula.pdf . 22.02.2012.
- RESZCZYŃSKÁ, M. & GAZDÍK, J. 2019: Vzepřeli se okupantům, vypískali i Jakeše. Výsadkáře před 50 lety smetla normalizace. <http://zpravy.aktualne.cz/domaci/vzepreli-se-rusum-porazila-je-normalizace.pdf> , 14.4.2019.
- SMATANA, I. 2019: Před 35 lety měla ČS armáda vpadnout do Polska, z operace Krkonoše 1980 ale sešlo. https://www.irozhlas.cz/veda-technologie_historie/pred_35_lety, 05.02.2019.
- ŠINÁGL, J. 2017: Dnes před 37 lety 1.12.1980 se chystala ČSLA zákeřně přepadnout Polsko pod krycím názvem „Krkonoše“. <https://www.sinagl.cz/domaci-zpravodajstvi/7798-dnes-pred> , 01.12.2017.
- ŠMÍD, M. 2016: Sebrali nám rádia a zakázali psát domů. <http://echo24.cz/aliV472/sebrali-nam-radia> , 09.01.2016.
- TOMEK, P. 2010: Státní bezpečnost v listopadu 1989. Paĝoj 27-42. In: CHVÁTAL, M. (ed.): Listopad 1989 v Československu. Sborník příspěvků z konference, 10.10.2010, Havlíčkův Brod, Muzeum Vysočiny, 77 paĝoj.- ISBN 978-80-8732-04-0.

Bildo 1: En Bruntál (1962). Ruĝa pionero, en konkurso de pionieraj sanitaristaj rondetoj.



Bildo 2
1976:

Ankaŭ dum ferioj mi okupiĝis pri parazitaj. Sur morta vesperto troviĝis kelkaj vivantaj ekzempleroj de parazita muŝo *Nycteribia latreillii* (Leach, 1817). Mikroskopajn preparatojn de la muŝoj mi dediĉis al katedro de parazitologio.



Bildo 3

La 1-a majo 1977:
Du pedagogoj de Bestkuracista Universitato en Brno, kiujn mi tre estimis: dr-o **Rostislav Zavadil** (1930-2002), parazitologo (maldekstre), kaj inĝ-o dr-o **Jaromír Šikula** (1924-2000), botanikisto, sekretario de Esperantista Klubo Brno (dekstre). Ili ne konsideris, ke soveta okupado (1968-1991) estis „internacia helpo”, tial ili povis docentiĝi nur post la jaro 1989.



Bildo 4

En Brno-Jundrov, decembro 1980. Kristnasko, tritaga libertempo. Tiam mi jam havas neniujn iluziojn pri armea servo kaj socialismo. Mi rakontas pri miaj travivaĵoj, sed neniu min komprenas (= volas kompreni), homoj estas influitaj per socialisma kontraŭpola propagando. Mi kaŝe simpatias kun pola Solidareco.



Bildo 5: En Brno-Jundrov, somero 1981, mallonga libertempo, sed jam fino de mia armea servo proksimiĝas.



Bildo 6

En Brno-Královo Pole, 1986. Deputisto de Ĉeĥoslovaka Popola Patrio (kristana demokrato) en Nacia Komitato Brno V. Inter 150 deputistoj de la Komitato mia partio havis nur 4 deputistojn, sed pli bone estis fari ion ol tute nenion.





Bildo 7

En mia laborloko, Bestkuracista
Esplorinstituto en Brno-
Mediánky,
la 27-an de novembro 1989.
Unu el gvidantoj de duhora
kontraŭsocialisma striko.

Mi estas deputisto
de Ĉeĥoslovaka Popola Partio
(kristana demokrato), subtenas
strikantajn studentojn
kaj politikon de Václav Havel.
Ne ĉiuj aŭskultantoj kun mi
konsentas.

Mia nomo baldaŭ estos
en listo de la laboristoj, kiujn
komunistaj gvidantoj volis
maldungi.

Bildo 8

1990: Socialisma sindikato, kiu kunlaboris kun komunistoj, estis
anstataŭita per sendependa Bestkuracista Sindikata Asocio, kiu
ne kunlaboris kun komunistoj. Tial mi kelkajn jarojn estis funkciulo
de tiu nova sindikato en mia laborloko.

